# Trovu vian paron! (2) – pariga ludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Formi demandojn, ekzerci esprimojn. |
| **Celgrupo:** | Komencantoj, depende de la taskoj en diversaj etapoj. |
| **Antaŭpreparo:** | Minimume 3 bildkartoj kun diversaj frazoj (ekzemplojn vidu sube). |
| **Tempo:** | 5-10 minutoj (plus anticipa klarigo) |
| **Ludantoj:** | minimume 6 |

La duono de la ludantoj elektas kartojn kun diversaj frazoj.
Poste, rondirante en la ejo, demandadas la aliajn (jam sen la karto!), la unua (aŭ la plej simpatia) kiu respondas jese estos sia paro, kun kiu eblas komenci la sekvan taskon.
La gvidantoj/instruistoj povas ne nur unufoe uzi ĉi tiun parigan ludon, sed alifoje ankaŭ ties varianton. Necesas tamen bone klarigi la regulojn!
Foje povas okazi, ke iu neniel trovas paron. Tiam la gvidanto povas solvi la problemon, donante alian karton, aŭ simple proponas paron.
(Se la nombro de la ludantoj estas malpara, ankaŭ la instruisto estas inter la elekteblaj. Tiel, ankaŭ li/ŝi povas esti paro de iu, kun kiu kune solvas la taskon. Bone efikas al la grupo – eĉ se temas pri plenkreskuloj – se la instruisto kunludas. Kaj ankaŭ la „helpon” ni povas bone utiligi.)

**Modeloj:**

**A.**
Sur la karto:
Trovu iun kiu havas biciklon!
… kiu havas hundon!
…kiu ne havas aŭtomobilon!

Demando: Ĉu vi havas biciklon?

**B.**
Sur la karto:
Trovu iun kiu
interesiĝas pri arkitekturo/
pri klasika muziko/ pri artaj filmoj/
pri sporto/pri vetludoj …

Demando: Ĉu vi interesiĝas pri arkitekturo?

**C.**
Sur la karto:
Trovu iun kiu estas
pli alta /pli aĝa/ malpli dika/ ol vi!
…kiu naskiĝis en la sama jaro kiel vi!

Demando: Kiom alta/aĝa/peza vi estas?
Kiam vi naskiĝis?